ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 11

NOVEMBRO 2017 kol. 391/33

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Theodor Čejka, IJK-Afriko-Togolando, Optimismo en Barata universitato, 102a UK Seulo, Geniulo aŭ fantomo, Svisa glaĉero, Tosto por Zamĉjo, 46a seminario en Skokovy

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Theodor Čejka

Ĉi-jare, la 27an de novembro ni rememoros la 60an datrevenon de la forpaso de la grava ĉeĥa esperantisto, kunfondinto de la Esperanta movado en nia lando Theodor Nepomuk Čejka (Ĉejka). Li naskiĝis la 10an de januaro 1878 en Holešov en Moravio, kiel la unua el 7 infanoj de Jan Čejka, i. r. (imperiestra-reĝa) ĝendarmara kaporalo en Holešov. La edzino de Jan Čejka estis Jozefa, nask. Očadlíková, devenanta el familio de teksistoj.

Grandan parton el sia modesta, sed ĝoja infanaĝo Theo travivis en Hukvaldy, kien lia patro estis deĵore translokigita. Post la fino de baza kleriĝo li en la jaroj 1893 – 1898 studis en instruista institucio en Příbor apud Nový Jičín. Post la abiturienta ekzameno en la jaro 1898 li fariĝis provizora kaj poste definitiva instruisto en la nova, moderna, baza kaj poste en altgrada urbaj lernejoj en Bystřice pod

Hostýnem. En tiu urbo li pli malfrue konstruigis al si familian domon, fondis ĝardeneton, kien li por ĉiam translokiĝis. Li edukadis siajn lernantojn por amo al la patrujo kaj al la naturo, instruis al ili la fundamentojn de fruktokultivado, fondis kaj dum multaj jaroj gvidis skoltan taĉmenton.

En la jaro 1925 li edziĝis al fraŭlino Dobroslava Ryčanová, filino de regiona kuracisto en Kroměříž, kiu estis tre aktiva membrino de la gimnastika organizaĵo Sokol kaj de la skoltisma movado. Pro estimo al sia edzino Th. Čejka uzis, simile kiel la prezidento T. G. Masaryk, ŝian familian nomon – li subskribadis sin Ryčan Čejka, aŭ Th. R. Čejka. En la jaro 1929 naskiĝis al ili ununura filo, nuntempe nia grava bohemisto, lingvisto kaj tradukisto – docento de la Masaryk-universitato en Brno – PhDr. Mirek Čejka, CSc.

Pan učitel Theodor Čejka s manželkou a synem před svým domem v Lázních v roce 1944

Jam dum siaj studoj en la instruisto-institucio en Příbor Čejka amikiĝis kun la samklasanoj Valentin Bilík, poste instruisto en Vnorovy apud Strážnice, kaj Holub, kiu praktikis en Veřovice apud Frenštát pod Radhoštěm kaj poste en Kopřivnice.

Kune ili okupadis sin pri la problemaro de la internacia lingvo, kiu antaŭnelonge naskiĝis. Čejka poste skribis leteron al la fondinto de ĉi tiu lingvo, al la okulkuracisto D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof en Varsovio, de kiu li ricevis subtenon kaj bezonatajn materialojn. Čejka, Bilík kaj Holub ellernis la internacian lingvon kaj komencis propagandi ĝin. El la germana lingvo ili tradukis en la ĉeĥan kaj aperigis proprakoste la unuan ĉeĥan broŝureton nomatan „Universala lingvo Esperanto“. Poste

ili prilaboris kaj en la jaro 1900 eldonis la lernolibron „Esperanto. Internacia lingvo. Kompleta gramatiko kaj ekzerclibro kun vortaro Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta". Ĝi estis la unua ampleksa valora ĉeĥa lernolibro de Esperanto en niaj landoj. Ĝi havis 200 paĝojn kaj per siaj amplekso kaj kvalito ĝi superis la unuan lernolibron de Esperanto de Francisko Valdomiro Lorenz „Esperanto por Bohemoj“ el la jaro 1890. La eldono de tiu ĉi ampleksa kaj bone prilaborita lernolibro havis grandan signifon por la konstituo de grava Esperanta societo sub la nomo „La unua societo de esperantistoj aŭstriaj en Brno" en la jaro 1901. Pro tio Čejka estas opiniata la fondinto de la E-movado en la tiama Aŭstria-Hungaria-Monarkio.

La lernolibro prilaborita kaj kompletigita de Th. Čejka aperis en kelkaj eldonoj komence de la pasinta jarcento. La amplekso de la eldonataj lernolibroj ŝanĝiĝis. Ili estis precipe „Lernolibro de Esperanto por aŭtodidaktoj kaj kursoj" (1908), „Plena lernolibro de Esperanto (1908) sekvata de „Esperanto – malgranda lernolibro“ (1918), tiu lasta kune kun Krumpolc. Sume li eldonis 14 lernolibrojn de Esperanto, lingvajn publikaĵojn kaj vortarajn materialojn. Čejka ankaŭ fondis kaj redaktis Esperantajn gazetojn: „Revuo internacia. Monata gazeto“ (ĝi aperadis nelonge en la jaroj 1902 – 1903), „Český esperantista – Ĉeĥa esperantisto“ en la jaro 1904 kaj ankaŭ „Der Deutsche Esperantist – Germana esperantisto".

Th. Čejka partoprenis en multaj eksterlandaj kongresoj de la Esperanta movado kiel delegito de bohemiaj landoj kaj de la Aŭstria-Hungaria-Monarkio. Ekzemple li partoprenis en la Unua Universala Kongreso de esperantistoj en la nordfrancia urbo Bulonjo ĉe Maro, kiu akceptis la t. n. "Bulonjan deklaracion“, kiu fiksis la bazajn principojn de la universala E-movado

(propagandi internacian lingvon, faciligadi komunikadon inter la nacioj, ankaŭ spiritajn kaj materialajn rilatojn inter la homoj ne konsiderante naciecon, rason, sekson, religion aŭ lingvon kaj evoluigi solidarecon, komprenadon kaj estimon inter la homoj). Plie li partoprenis kongresojn en la svislanda urbo Ĝenevo (1906), en la grandbritia universitata urbo Kembriĝo (1907) kaj en la nederlanda Amsterdamo. Li estis invitita kiel membro de la honora komitato de la unua Tutaŭstria kongreso de esperantistoj en la jaro 1910 en Vieno. La kongreson partoprenis pli ol 100 delegitoj, kiuj reprezentis 86 E-societojn germanajn, ĉeĥajn, polajn kaj serbiajn.

La bone progresanta agado de la E-movado estis interrompita de politikaj eventoj, kiuj kondukis al la dua mondmilito. Dum la okupacio ek de la jaro 1940, fare de la nazioj la E-movado estis strikte malpermesita. Multaj esperantistoj partoprenis en neleĝa agado kaj vico da ili pereis en koncentrejoj.

Post la jaro 1945 la Esperanta movado reaktiviĝis, sed post la jaro 1948 ĝi estis denove subpremata de la reganta komunisma partio. En la jaro 1952 la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista eĉ estis ĉesigita kaj malpermesita. Esperantistaj kluboj povis aktivi nur kadre de klerigaj institucioj aŭ t. n. „Parkoj de kulturo kaj ripozo“.

Nur en la jaro 1969 en Brno estis okazigita konstitua kongreso kaj estis fondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Ĉeĥaj esperantistoj diversokaze plenestime kaj kun dankŝuldo rememoras la personon de la fondinto de la ĉeĥa E-movado Čejka.

Ekzemple en la urba parko en Příbor, subtene de la urba estraro kaj per signifa subteno de esperantista klubo, en la jaro 1964 estis solene senvualigita digna monumento al „Theodor Čejka – la

fondinto de la E-movado ĉe ni, kiu en tiu ĉi urbo en la jaroj 1894 – 1898 studis en la instruista institucio".

Tre aktivaj esperantistoj de Přerov en la jaro 1998 sur tiea bazlernejo malvualis memorplaton kun tiu ĉi teksto: „Memore al la instruistoj Josef Krumpolc kaj Theodor Čejka, la fondintoj de la E-movado kaj de la klubo en Přerov en la jaro 1923, dediĉas esperantistoj“. Tiu ĉi memorplato dum riparo de la lerneja fasado bedaŭrinde estis difektita, sed post la riparo de la fasado ĉi tie aŭtune en la jaro 2008 estis instalita memorplato nova.

T. Čejka J. Krumpolc

La 11an de junio 2011 okazis solenaĵo al la centjara datreveno de la fondo de la Esperanto-klubo en Olomouc. Ĝi realiĝis en bela somera vetero ĉe memoriga monumento de Esperanto en la Parko de Bedřich Smetana en Olomouc kun la ĉeesto de ĉirkaŭ cent delegitoj de Esperanto-kluboj el la tuta respubliko.

La signifon de tiu ĉi datreveno pliigis per sia partopreno la ĉefurbestro de la urbo Olomouc – Martin Novotný kaj la prezidantino de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj nia estinta membrino Jana Melichárková.

La programon de la solena renkontiĝo inaŭguris la prezidanto de la Esperanta sekcio „La Patrujscienca Societo Muzea en Olomouc“ – Jan Duda i. a. per rememoro pri Theodor Čejka. La ĉefan solenan paroladon prezentis la jam menciita filo de Theodor Ĉejka, Mirek.

Persono de Universala E-Movado – instruisto de Bystřice, Theodor Čejka travivis vere riĉan vivon plenan de laboro por aliaj homoj kaj por la socio. Lia cindra urno estis pietate metita en la urnan boskon en la tombejo de Bystřice.

Tradukis Josef Hron

IJK en HANEH, Togolando-Afriko

Ĝi estas la unua Internacia Junulara Kongreso en Afriko, mia unua IJK, kiun mi ĉeestis kaj post mia unua AKE (Afrika Kongreso de Esperanto) de UEA en Bunda, Tanzanio, kie unuafoje mi propraokule vidis la honoran nunan vicprezidanton de UEA, sinjoron Stefano MacGill. Tiu ĉi kongreso havis kongresan kurieron, bedaŭrinde en ĝi ne estis la nomaro de ĉiuj gekongresanoj.

La IJK okazis en Haneh, togolanda urbo, kiu havas dudek kvin mil loĝantojn, situanta kvin kilometrojn oriente de la ĉefurbo Lomeo. Ĝi estas la lasta urbo antaŭ la limo kun Benino laŭgeografie. Ni ekskursis al akvofalo, tridek kilometrojn de Kpalime tien kaj reen al la vilaĝo Womé kaj ĝia akvofalo. Gekongresanoj naĝis en la sanigaj akvoj. Ni vizitis kakaŭjajn kampojn kaj kafarbojn. Kvar horoj per rekta buso, sed ambaŭ direkten ok horojn pli malpli.

Kial mi la kongreson nomis „Diarea kongreso“? Pro tio, ke preskaŭ 90% de la kongresanoj malsaniĝis pro diareo. Kelkaj esperantistoj urĝe per ambulanc-aŭto estis transportitaj en

malsanulejojn kaj tie ili estis enhospitaligitaj. Kelkaj sonĝe pensumis, ke temus pri bakterioj, aliuloj pri ne bone faritaj kuiritaĵoj kaj kelkaj pri epidemio. Do, ni ne tute ekzakte sciis, pri kio reale temas. Tio okazis dum unu semajno. Oni ne parolis kun kuracisto, por ke laŭ la simptomoj, oni ne esploru, ĉu iu eble infektiĝis de ebolo aŭ ne.

Mi ne povintus ne paroli pri Hans Bakker. Se mi ne lernus Esperanton de li, mi do ne ĉeestus tiun ĉi gravan internacian aranĝon. Do, la plej bona maniero, en kiu ni povas honori la memoron de la forpasintoj, estas laŭkapable daŭrigi ilian laboron, citi ilin ktp. Ni ankaŭ danku la TEJO-stabon, pro ege granda helpo partoprenigi junajn geafrikanojn en tiu ĉi grava internacia aranĝo. Dankon pro la donacoj el diversaj landoj kaj personoj.

Mana Namutema Brinson

Optimismo kun defio en barata universitato

Unu studento demandis: „Ĉu vi estas optimisma pri la estonto de Esperanto?” La respondo estis mikso, en kiu unu el la pozitivaj elementoj estis la kreskoj en la ĉina movado tra la lastaj jaroj. Tio donis perfektan enirpunkton por la defio: Ĉi tiu lando, Hinda Unio, spertas similajn kreskon kaj evoluon, tiel ke la kondiĉoj ekzistos por iom komparebla fortigo de la movado en Barato, nur se ni trovos la aktivulojn por antaŭenigi la aferon.

Ja tiuj demando kaj respondo okazis en la angla lingvo, kadre de la prelego „Esperanto – lingvo por dialogo kaj paco“, farita de la vic-prezidanto de UEA,

Stefan MacGill, al studentoj de la Universitato Azim Premji en Bengaluro. Tio estas malgranda universitato, kun 800 studentoj kaj 100 instruistoj kun limigita studfakaro: pri la sociaj sciencoj, edukado, sociaj evoluigo kaj politiko. Do, tre konvena studentaro por reagi pozitive al la mesaĝo de Esperanto.
La elektita temo koincidis kun la Semajno de Gandhi, festata tra la lando kaj en tiu universitato. Do, la prezentaĵo tuŝis tiun respektatan, sed neprecize difineblan nocion – la internan ideon. La studentoj estis jam bone informitaj pri Esperanto – kelkaj el ili ja parolas la lingvon kaj partoprenos en la 4a Sud-azia seminario (SAS) post semajno. Ili estas membroj de E-grupo, kiu ĉiusemajne renkontiĝas en la universitato sub la gvido de d-ro Giridhar Rao. Do, la nuna prezentaĵo ne devis komenciĝi de la nula punkto, anstataŭe ĝi faris iujn konstatojn pri la ecoj de la parol-komunumo, kiuj estas malsamaj al tiuj de naciaj aŭ etnaj lingvoj – malmultaj denaskaj parolantoj, alveno al la lingvo pro konscia decido, limigita lingva nivelo pro neintensa uzo, limigitaj infrastrukturo kaj financaj rimedoj ktp.

Stefan MacGill el UEA

La 102a Universala kongreso
22. - 29. 7. 2017

La duan fojon la UK okazis en Suda Koreio en ĝia ĉefurbo Seulo. La prestiĝa evento disvolviĝis fine de julio en Hankuk Fremdlingva Universitato. Kolektiĝis 1174 geesperantistoj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj, allogataj de la azia kulturo. Novuloj spertis esperantistan etoson kaj ĝuis interesajn momentojn en amika rondo.
En la ĉirkaŭaĵo de la Universitato flirtis E-flagoj anoncantaj la

eventon. Koreaj samideanoj produktis amason da belegaj afiŝoj kaj banderoloj por diversaj Esperanto-okazaĵoj. Dum la daŭro de la kongreso ili konstante kaj pasie laboris por nia bonfarto.
La inaŭgurtago bonvenigis nin pluve. Tamen tio ne malhelpis entuziasman renkonton kun malnovaj kaj novaj geamikoj. En la enirhalo la kongresanoj povis admiri kelkajn ekspoziciojn: fotojn, el pasintaj kongresoj, pri L. L. Zamenhof, pri Esperanto, kaj admirinde belaj estis ventumiloj. Eblis sin vesti kaj fotiĝi en reĝaj kostumoj.

La kongreso konsistis el la kutimaj programeroj de la movada foiro, kleriga lundo, tago de lernado, merkredaj tuttagaj ekskursoj, junulara programo, komitata forumo, strategio kaj kunsidoj, traktado de la kongresa temo, kiu ĉi-foje estis: „Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo".

Okazis IKU-AIS sesioj, lingvaj kursoj kaj KER – ekzamenoj, kunvenoj de diversaj asocioj, SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado), LIBE (Ligo Internaciaj de Blindaj Esperantistoj), IKUE, KELI (kristanaj organizoj), ISAE (sciencistoj), IKEF (komercistoj), IEJA (juristoj), TEĴA (ĵurnalistoj), IREK (komunistoj), TADEN (nefumantoj) kaj aliaj.
Kunvenis ankaŭ legantoj de Esperanto, ateistoj, Akademio de Esperanto, Afrika-, Oomoto- kaj Ŭonbulismo-movadoj. Okazis multaj aliaj interesaj programeroj, inter kiuj pluraj prelegoj pri Koreio, Aŭtoraj duonhoroj, Oratora kaj Belartaj konkursoj,

Aŭkciado. Ne mankis komuna fotado, urba akcepto, bankedo kaj kongresa balo, kiun animis la litova grupo Asorti. Ĉi-foje ne okazis strikta kontrolo ĉe enirpordoj al la diversaj okazaĵoj. Ankaŭ neniu estis priŝtelita laŭ mia scio. La kongresanoj povis manĝi je modestaj prezoj en studenta manĝejo.

Enkondukiĝis la nova programero Korea Kulturĉambro, kie ni povis gustumi korean teon, mem ornami ventumilojn per sekigitaj floretoj, lerni danci kaj sekvi prezentojn de korea folklorkulturo.
Ekster la programo okazis Internacia Pontkunveno en la Parlamentejo pri la Unuiĝo de la Korea Duoninsulo, kiun ĉeestis 130 personoj el 21 landoj.
Estis elektitaj du honoraj membroj de UEA kaj disdonataj diplomoj pro elstaraj agadoj. Oratora kaj Belartaj konkursoj, premio Deguĉi, atestiloj pro 50- kaj 40-jaraj membriĝoj en UEA. Estis eldonita poŝtmarko kun la portreto de L. L. Zamenhof kaj serio da belaj bildkartoj.

La kongresa kuriero „La Kandellumo verda" anoncis ĉiujn novaĵojn, ŝanĝojn en la programo, impresojn de la partoprenantoj, en la listo aperis nov-aliĝintoj ktp. Kiel ĉiam, ampleksa estis la libroservo.
Gaja surstrata manifestacio kun tamburado sin direktis al loko, kie okazis la futbalmatĉo, en kiu unuafoje gajnis la esperantista

teamo je granda ĝojo de ni ĉiuj.
Pluraj ĉiutagaj ekskursoj ebligis konatigi nin kun la naturo de Koreio, kiu konsistas el maro, montoj, riveroj, kampoj, vilaĝoj, urboj kaj urbegoj, palacoj, ĝardenoj, temploj kaj diversaj aliaj kulturaĵoj de jarmila historio.
Dum vesperaj kulturaj programeroj prezentis koncertojn Kajto, Asorti, Ĵomart kaj Nataŝa, Eruda Li kaj Maju. La teatraĵon „El la vivo de insektoj", prezentis la ĉeĥa ensemblo DOMA. La trupo Espera Mondo prezentis koreajn tradiciajn artojn. Dum la Nacia vespero prezentiĝis la simfonia orkestro *Arirang* kaj ni povis spekti diversajn admirindajn programerojn. Ankaŭ la internacia arta kaj azia vesperoj estis mirindaj.

En la fermo de la Universala Kongreso ni eksciis pri la venontaj kongresurboj. En la jaro 2019 la kongreso okazos en Lahti, Finnlando kaj en 2020 en Montrealo, Kanado. La venontjara UK disvolviĝos en Portugalio, en ĝia ĉefurbo Lisbono de la 28-a de julio ĝis la 4a de aŭgusto.
Bonetosa estis la fermo de la kongreso, al kiu kontribuis la nederlanda grupo Kajto. Laste prezentiĝis infanoj el la Infana kongreseto, kiuj venis saluti nin en rekorde granda nombro.
Ĉiuj, kiuj povis partopreni la ĉi-jarajn kongresojn en Koreio devas senti sin feliĉaj. Koreaj sindonemaj kaj laboremaj samideanoj ne seniluziigis nin pri la pasintjare promesita grandioza kongreso kun surprizoj. Ni plene ĝuis ilian gastamon en amikeca harmonio. Líba Gabalda

Geniulo aŭ fantomo?

Oni diris, ke Niccolo Paganini (1782 – 1840) kompliciĝis kun diablo, por ke li povu ĉarmigi homojn per sia violon-ludado.

Cirkulis pri li vico da famoj, kvankam lia vivo estis eĉ sen tiuj sufiĉe interesa.
Skeletsimila figuro, nekutime granda kapo kaj ĉefe nehome longaj korpomembroj. Paganini dankemis por sia virtuozeco ne nur al kruela trejnado, sed ankaŭ al Marfan-sindromo; tio estas genetika malsaniĝo de liga histo. La homoj kun tiu ĉi lezo havas kutime aranean aspekton; iliaj fingroj estas eksterordinare longaj kaj ekstreme flekseblaj. Ankaŭ dank´al tio sukcesis Paganini violonon ludi kiel tion la ceteraj konsideris absolute malebla. Tiam neniu sciis ion pri genetiko, do granda parto de la homoj pensis, ke li ŝanĝis sin je kriplulo sub influo de malhelaj sorĉoj.

Perfekta amanto:
Li naskiĝis la 27an de oktobro 1782 en Ĝenovo, kiel unu el ses idoj de vica ludanto de mandolino. La severa patro baldaŭ donis al li sian muzikilon kaj poste aldonis al li ankoraŭ violonon. La knabo devis ĉiutage sin trejni sep horojn; kiam li ne plu deziris sin trejni, li ne ricevis manĝon.
Baldaŭ estis videble, ke Niccolo havas eksterordinaran talenton.

Kiel naŭjara li jam koncertis kaj en la jaro 1801 li veturis por turneoj. Tamen baldaŭ li hazardludis, kaj kelkfoje li devis eĉ vendi la propran violonon.
Dank´ al siaj demona aspekto kaj muzikaj kapabloj li fariĝis amanto de virinoj. Pri Paganini famiĝis mitoj, ke li estas perfekta amanto, kiu al neniu virino trompos... La ĉefan lokon inter liaj amantinoj sukcesis gajni la princino Elisa Bonaparte, pli juna fratino de Napoleono. De la jaro 1797 ŝi estis edziniĝinta ĉe

nobelo de Korsiko, Felix Baciocchio, sed ŝi ne estis al li tro fidela. Niccolo eĉ estis ĉe ŝi en la jaroj 1805-1809 okupita. Pri iliaj amrilatoj poste Franz Lehár verkis opereton, ĝi havis premieron en Vieno en la jaro 1925. Paganini neniam edziĝis, sed unu idon li havis. El mallonga amrilato kun Antonia Bianchi naskiĝis la filo Achille en la jaro 1825. Sed Niccolo ĉesis interrilati al la familio, ĉar li koncertis tra Eŭropo.

Paganini atendis sian enterigon 36 jarojn.

Lia majstreco ne estis nur kaŭzo de nura genetika misformo. La majstro havis ankaŭ genian memor-kapablon, li ludis sen muziknotoj la plej malfacilajn komponaĵojn el la propra cerbo kaj propramane skribitajn partiturojn li rifuzis eldonigi. Post lia morto daŭris pli ol kvindek jaroj, antaŭ ol troviĝis iu, kiu provis kaj pruvis ludi liajn plej malfacilajn komponaĵojn kaj skribi ilin en muziknotoj.

Unu el la legendoj diras, ke la virtuozo sukcesis ludi koncerton ankaŭ post la krevo de tri el kvar kordoj. Laŭ unu versio – Paganini mem ektranĉis la kordojn, ke li povu antaŭ publiko montri siajn spertojn, laŭ la dua versio ĝi estis sabotado. Bedaŭrinde, Paganini malsaniĝis de sifiliso. La malsaniĝo tiam estis kuracata per hidrargo. Kvankam la malsano iomete malfortiĝis, tamen ĝi havis vicon da kromaj efikoj. Antaŭ la fino de sia vivo Paganini suferis pro malsaniĝo de la laringo, tiel ke li preskaŭ jam ne povis paroli.

Li mortis la 27an de majo 1840 en Nice, kie li estis paradokse kuracita. Rilate al lia diabla famo la reprezentantoj de la itala

eklezio lin rifuzis enterigi en lia naskiĝurbo Ĝenovo, normalan entombigon tiu ĉi virtuozo havis nur 36 jarojn post sia morto, ne en Ĝenovo, sed en Parma.

Oldřich Mudra, esperantigis Jarmila Rýznarová

Svisa glaĉero malkaŝis paron, kiu malaperis antaŭ 75 jaroj

Svisaj amaskomunikiloj raportis en la monato julio 2017, ke la paro malaperinta antaŭ 75 jaroj en Alpoj, estis trovita en malgrandiĝanta glaĉero.

La 15an de aŭgusto 1942 Marcelin kaj Francine Dumoulin, kiuj estis gepatroj de sep infanoj, foriris por melki siajn bovinojn en kamparo de la vilaĝo Chandolin (Kantono Valezo – Svislando) kaj de tiam ili neniam estis trovitaj.

"Ni dum la tuta vivo, senĉese serĉis ilin. Ni planis iam havigi al ili dignan meritan funebron. Mi diras, ke post 75 jaroj de atendado, tiu novaĵo profunde trankviligas min", tion diris al la gazeto "Le Matin" la plej juna filino de la paro, Marceline Udry-Dumoulin, 79jaraĝa.

Per vespera komunikaĵo la polico de Valezo informis, ke la du korpoj estis trovitaj de iu laboristo en la lasta semajno, kune kun siaj identigiloj, en la Tsanfleuron-Glaĉero, proksime al aertelfero de skiado super la turisma stacio Les Diablerets. Tiuj korpoj troviĝis flanko-ĉe-flanke, tute konservitaj en la glaĉero kaj iliaj

proprajoj aspektis netuŝitaj. DNA-ekzamenon oni realigos por konfirmi la identecon de la paro. Ĉi tiu teksto estas adaptaĵo fare de Paŭlo Cesar Pires el portugallingva artikolo.

Tostoj por Zamĉjo

Omaĝe al la 100jara mortdatreveno de LLZ grupanoj de E-mental aranĝas en multaj urboj renkontiĝon, ĉe kiu ili pendigas E-flagon sur altaj turoj aŭ pontoj kaj dum la okazo ili tostas honore al la kreinto de nia lingvo. Okaze la 13a Tosto ni promenis en Prago al Vyšehrad kaj ankaŭ en la restoracio „V Podskalí ni baptis Esperantan manĝo-karton.

La 14a Tosto estis en Ostrava, la 15a Tosto en Svitavy estos 5. 11. 2017 kaj la 16a Tosto estos en Pardubice 3. 12. 2017. Ni rekomendas al esperantistoj, kiuj loĝas en Pardubice kaj ĉirkaŭaĵo, ke ili partoprenu tiun aranĝon. Informojn vidu ĉe http://www.e-mental.cz Lenka Angelová

La 46a lingva seminario en Skokovy

En du belaj sunaj tagoj, en la konata pensiono de d-ro Hradil en Skokovy, en la tagoj 7-10a de septembro 2017, partoprenis 18 fidelaj skokovanoj. Ili diligente lernis, parolis, diskutis. La pinta programero okazis sabate vespere, kiam la aktorino Stanislava Hošková prezentis la reĝinon Eliška Rejčka. La prelegojn prepa-

ris: Margit Turková, Jana Křížková, Líba Filipová, Jindřiška Drahotová. Amuzis nin Vlasta Stará per siaj lingvaj aventurspertoj kun usonano (la vizitanto).
Instruado de Esperanto okazis en tri grupoj kun tri instruistinoj.

La funga sezono havigis al ni bongustaĵojn en la pensiona manĝejo. Prezentita estis libro, kiun eldonis Margit Turková „Scházíme se v této knize“ (Ni renkontiĝas en tiu ĉi libro) kaj freŝa volumo LEGAĴOJ III. de Jindřiška Drahotová. Informo pri eblo regule ricevadi rete fabelojn el la gazetoj Juna Amiko kaj La Mondo rakontas de Theodor Kilian en spegula formo – Esperanta-ĉeĥa. La fabelojn prizorgis Blanka Hužerová kaj Jindřiška Drahotová. Abonu: drahotova@esperanto.cz

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 300,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 20 €. IBAN: CZ8108000000001926460283 BIC: GIBACZPX
Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.